

aŭ real-proksimajn estaĵojn. Tial oni nur malofte trovas vivograndajn figurojn en la afrika arto, kaj ankaŭ la malgrandaj figuroj ne respegulas naturajn proporciojn. Ĝuste pro tio la skulptarto estas tiom frapa kaj miriga en sia efiko.

Spiritaj kaj bestaj figuroj ĝenerale ja ne pretendas aspekti kiel la prabildoj, sed ili povas kaj celas anstataŭi ilin aŭ ties magia alvoko. La memorfiguroj pri prauloj, kiuj troviĝas en religiaj relikvokesto, aŭ la gardad-figuroj (plej ofte el ŝtono) por protekto de domo, korto kaj kampo estas aŭ la spiritoj mem aŭ iliaj adorantoj.

Tiaj artaĵoj plej ofte estas potenc-portantoj kaj ilia efiko en religia rilato dependas unue de la lerteco de la artisto kaj due de la ritoj kiuj ĉirkaŭas ilin. La specifa signifo de la skulptaĵo dependas de la socia kaj kultura medio en kiu ĝi estas farita. Pro tio fiaskis la provoj por komerca fabrikado de veraj artaĵoj. Kopioj faritaj pro profitavideco aŭ por kontentigi fremdlandajn vizitantojn kiel potencialajn aĉetantojn estas senvivaj kaj arte senenhavaj.

Resumo

La plej multaj afrikaj artaĵoj estas forte ligitaj al tradicio kaj determinataj laŭ tribaj strukturoj kaj religiaj kredoj. Ne la imitado de la naturo, sed la en ĝi realigataj fortoj ricevas klare difinitajn signifojn. Maskoj kaj figuroj estas portataj de dia potenco. La artistoj donas al ili realan formon, faras evidentajn, videblajn, preskaŭ “palpeblajn” la fortojn de dioj, demonoj, fantomoj, forpasintaj parencoj, kaj pere de tio konservadas la universajn kaj mondajn kreaĵojn fortojn.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Rüdiger SACHS

Vor dem Brückentor 3

DE – 37269 – E s c h w e g e

GERMANIO

<isaesachs@aol.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro laboris de 1976 ĝis 1978 kadre de germana evolu-projekto kiel la direktoro de “Ecole de Lutte Anti-tsetse” (“Instrucentro pri Lukto Kontraŭcececa”) en Bobo-Dioulasso, Supra Volta (la nuna Burkino), unu el la plej gravaj okcidentafrikaj centroj de maskoskulptado kaj maskodancado.

Ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala internacia lingvo

Wolfgang GÜNTHER

“La rilato inter ekonomia prospero kaj homa evoluo estas nek aŭtomata nek rekta.”
(el la Raporto de la UN-Programo pri Evoluigo, angle “UNDP”, 1998)

Jen la situacio:

- En nia nuntempa mondo ĉiun 6-an sekundon mortas 1 infano pro subnutriĝo.
- Ĉiutage forpereas ĝis 130 planto- kaj bestospecioj.
- Ankoraŭ validas, ke ĉirkaŭ 20% de la mondloĝantaro disponas pri ĉirkaŭ 80% de la mondresursoj kaj de la el tiuj produktitaj varoj.
- Laŭ takso de UN perforto kaj malriĉeco igis 21 milionojn da homoj fuĝintoj kaj 175 milionojn migrintoj.
- De pli ol 30 jaroj ĉi tiu mondo ĉiujare konsumas 30% pli da resursoj ol la naturo povas regeneri kaj trotoksas la biosferon je 40%.

En tio, kulturo kaj komunikado grave rolas kaj la alta rapido de la homaj aktivaĵoj plifortigas ĉi tiujn tendencojn. La “ni” fariĝis kunhoma **kaj** biosfera pronomo. Ni homoj kiel pensa viva materio esence estas parto de la naturo kaj nia partnereco kun ĝi determinas nian sorton.

La evoluiga problemo de la tutmondiĝanta homa komunumo estas **la antagonismo inter la justeco- kaj la medio-krizoj**. Ĝi fariĝis **LA** rekonilo de nia epoko kaj ĉe tio en la justecokrizo kontinue kaŝiĝas la antagonismaj fortoj inter libereco kaj egaleco. La dilemo konsistas en la postulo, ke, solvante la justecokrizon,

oni ne (pli)malbonigu la mediokrizon. Ni bezonas ambaŭ: universale akcepteblan soci(al)an justecon kaj universale integran biosferon. La progresigo de la malriĉuloj al la ekonomia kaj ekologia niveloj de la klaso de konsumantoj necesigus minimume 2 ĝis 3 pliajn Planedojn Tero. La logika sekvo estas, ke por inda futuro la vivonivelo de la pliriĉuloj devas esti decide limigata, eĉ grave reduktata.

Decida koncepto por solvi la dilemon estas **“la soci-ekologia daŭropoveco”**, kies centra karakterizilo estas **la preventivo**. Preventivo ne nur forme de aktiva farado, sed ankaŭ de aktiva forlasado, ekz. la rezigno pri intervenoj en “okazo de dubo”. Ĉi tiu ampleksa koncepto estas nuntempe antaŭenpuŝata precipe de UN kaj de la t.n. civilsocio (la neregistaraj organizaĵoj). La diversaj naciaj registaroj nur tre heziteme partoprenas en tio (kun preskaŭ ĉiam la sama preteksto de “la devigoj pro la faktoj”). Resumite en unu stabila formulo: **Daŭropoveco signifas egalecon de liberaj homoj en soci(al)e justa mondo kaj sana medio, nun- kaj futur-generacie.”**

Spite al multaj obstakloj montriĝas, ke ĉi tiu nova paradigmo-idealo taŭgas por evoluigi la homan socion surbaze de laŭeble plej sciencaj, objektivaj, senideologiaj kaj interkonsenteblaj komponantoj. La evolucio ekpilis la memorganizan homon per konscio, scioj, konscienco kaj volo.

Ĉi tiuj karakteriziloj okaze de neceso povas generi novajn valorigajn kriteriojn en teorio kaj praktiko, t.e. por konscia ŝanĝo de la propra konduto direkte al konkreta kaj efika kreado de universala justeco kaj konservado de integra biosfero.

Nuntempe, kiam ekz. en Germanio la fiŝhokado rigardatas oportuna por evoluigi kaj konservi baze demokratian kulturon, la monda ekonomio devas esti aranĝata tiele, ke la grandaj regionoj de fiŝkaptado estus protektataj kontraŭ troekspluatado. Konscio, racio kaj konscienco devigas al tiucelaj volado kaj agado, ĉi-okaze kiel en sennombraj aliaj situacioj.

Ne nur por eksplicite verda ekonomio tio signifas, ke oni submetu en ĉiuj kampoj de homa aktivado konceptojn de daŭropoveco kaj preventado, kaj evoluigu ilin.

Prioritaton ĉi-koncerne havas konsekvenca sindeterno de la mekanismoj de tutmonda kapital- kaj profit-pelita kaj ofte nur por mallonga tempo orientita eknomia kreskado, kiu ekspluatas kaj damaĝas la medion kaj homan socion. La neceso pri ŝanĝiĝoj videblas en preskaŭ ĉiuj kampoj de la hom(ar)aj aktivaĵoj. **Kaj ni devas ekagi nun!** Eble ja prave dubendas, ke atendado ĝis pli da katastrofoj estas ankaŭ strikta afero de la evolucio...

Kiel ĉiuj aliaj areoj de homa vivo, **kulturo kaj komunikado** estas temoj de pritaksoj kaj postuloj pri soci-ekologia daŭropoveco. Kontraŭ la biosferon oni ne agas nepunkte! Kaj etnaj lingvoj, ekz. la angla, pro sia longtempa ĝisnuna instrumentigo ĉi-cele, grave tendencas esti parto de la pereiga neoliberalisma doktrino, en kiu libereco (de la kapitalo kaj de la kunludantoj sur la mondmekato) pli gravas ol egaleco, justeco kaj daŭropoveco. Nur tro klare montras tion la aktuala financkrizo de la tutmondigita homa socio!

Jen kelkaj ĉi-loke taŭgaj ekzemploj: Aktuale la interreto foruzas tiom da energio kaj resursoj kiom la tuta tutmonda aertrafiko. La homa genomo fariĝis kaŭzo de monigemaj patentoj. Indiĝenaj popoloj ankoraŭ estas mizerige ekspluatataj kaj diskriminacitaj. Ene de EU la dominado de la angla lingvo signifas ĉiujaran avantaĝon de 17 miliardoj da eŭroj por la brita ekonomio. La *Grin*-raporto, publikigita 2005 de la franca registaro, informas, ke EU povus savi 25 miliardojn da eŭroj per la enkonduko de Esperanto. *L. Áron* prezentis en 2007 paperon, en kiu la kostoj de lingva malleco en Eŭropo estas taksata je 350 miliardoj da eŭroj ĉiujare, kio egalas al 3% de la malneta produkto (angle *GDP = Gross Domestic Product*) de EU (2005). La ĉiujara mona profito el tiu ĉi situacio sumiĝas por Britio je 900 eŭroj por EU-civitano.

En la kampo de internacia/interkultura komunikado/interkompreniĝado neŭtrala internacia (ponto- aŭ help-)lingvo kiel **Esperanto estas la ununura universala komunikilo kun imanenta soci-ekologia daŭropoveca kapacito**. Estas grave, ke la oficiala Esperanto-movado en siaj variaj formoj internigu ĉi tiun memidentecon de daŭropoveco, apud tiuj de paco kaj homaj rajtoj. Neŭtrala internacia lingvo en la postondo de soci(al)e kaj biosfere detruemaj ideologioj estas absoluta groteskaĵo! Ĉiukaze la enkonduko de neŭtrala ne-etna internacia lingvo estus ankaŭ **ekonomia konverto** al daŭropoveco en la kampo de interkomunikado

ĉiunivela. Nek de ekonomia nek de soci-ekologia vidpunktoj la oficiala politiko de plurlingveco de EU donas sencon. Ĝi estas sennecese multekosta, resursodisipema kaj praktike ne realigebla. Ĝi estas politika decido, facila kompromiso, malgranda kaj neprezinda komuna denominatoro. En realo la 3 etnaj lingvoj angla, franca kaj germana, precipe kaj domine la angla, transprenis la rolon de komuna (labor-)lingvo, tiele donante gravan avantaĝon al ties denaskaj parolantoj. Ĉi realo tre verŝajne kondukos al marĝeniĝo de lingvaj kaj kulturaj minoritatoj. Kontraste, la lernado kaj aplikado de neŭtrala internacia lingvo signifas egalecon kaj justecon por ĉiuj.

Male al ĉiuj etnaj lingvoj Esperanto estas soci-ekologie daŭropoveca rimedo de (inter)komunikado pro tio, ke ĝi **pro si mem** estas preventema. Nur tre malmultaj homaj eltrovitaĵoj povas aserti tion pri si. Ĉi tiu imanenta soci-ekologia daŭropoveco prezentigas en du formoj, nome kiel **“demokratia dulingveco”** kaj kiel **“biosfera adekvateco”**. En detaloj tio signifas:

1-e.

Laŭ **kvalita** kriterio kaj rilate la mondvastan justecokrizon la utiligo de **Esperanto kiel “unu lingvo por ĉiuj”** sur inter-kultura, inter-etna kaj inter-nacia niveloj estas **socie daŭropoveca** interkomunikado, ĉar ĝi **dekomenca reduktas porsociajn riskojn** pro tio, ke ĝi forigas la avantaĝigon de ajna etna lingvo, efektivigante universalan justecon rimate de la preventive justiga principo de **“demokratia dulingveco”**.

2-e.

Laŭ **kventa** kriterio kaj rilate la mondvastan mediokrizon la utiligo de Esperanto sur regiona kaj superregiona niveloj estas **ekologie daŭropoveca** interkomunikado, ĉar ĝi **dekomenca reduktas pormediajn riskojn** pro tio, ke ĝi forigas la malavantaĝojn por la biosfero, efektivigante universalan medioprotektadon rimate de la preventive ekologiiga principo de **“evitado de priresursa disipado kaj albiosfera toksado”**. (Esperanto reduktas la nombron de la tradukvojoj de “n(n-1)” al “n”, se “n” estas la nombro de la lingvoj, en EU nuntempe de 506 al 23. Aldone la impostŝarĝo de la averaĝa civitano de EU por lerni Esperanton reduktiĝas al malpli ol 5% de tiu necesa por lerni 3 fremdlingvojn, kiel kelkfoje estas postulate de EU). Kompreneble Esperanto forme de siaj individuoj

kaj kolektivoj efikas negative sur la medion. Ĉi-cele pripensendas ekz. “la ideologio de esperantisma mondprivojaĝado”. Por mildigi/nuligi la neeviteblajn kontraŭekologiajn efikojn pro la agado de la “oficiala esperantismo” oni bone povus establi kompenso-mekanismojn, ekz. partoprenadon en reforstumaj projektoj.

Resume do konstateblas, ke la imanenta ekologia memidenteco de Esperanto estas taŭga ekzemplo de ekonomie bone aplikebla daŭropoveco en la kampo de internacia komunikado kaj koncerne la justeco- kaj medio-krizojn. La racie kaj logike ampleksigita “interna ideo” de la esperantismo metas la projekton de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto en la unuan linion de futurinda tutmond-iĝo. Jen ĉi-rilata propono por verdire plej esenca kaj absolute necesa preamblo por la “Manifesto de Prago de la Movado por la Internacia Lingvo Esperanto”:

Biosfero kaj Justeco

La homa specio estas parto kaj partnero en la tuto de la viva kaj malviva materioj. La homfaritaj medio- kaj justeco-krizoj koncernas ankaŭ la interkomunikadon/interkompreniĝadon interindividuan kaj intersocian. En la tutiĝanta mondo la memorganizado/memkonservado de la pensa viva materio direkte al kaj avantaĝe por si mem devas fariĝi kolektiva kaj komunikada inteligento por la vivo entute. Esperanto estas neetna helplingvo kaj kiel unu lingvo por ĉiuj imanente neŭtrala, justiga kaj materie maldisipa. Ni asertas, ke la tutmonda komunikado devas okazi laŭ principoj de **dekomenca daŭropoveca evoluigo**, t.e. de nedifektemo kontraŭ la biosfero kaj de atingado de tutmonde interhoma justeco. Ni estas movado de unuarange daŭropoveca interkomunikado / interkompreniĝado.

Literaturo

R. Phillipson, Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko, UEA, Rotterdam, 2004 (ankaŭ en la angla)

R. Selten, La kostoj de la Eŭroplingva (Ne-)Komunikado, “espeRanto”raDIKALA asocio, 1997

F. Grin, Foreign Language Teaching as Public Policy, High Council on the Evaluation of the School System in France, 2005

K. Gawlitta, S. Ó Riain, Grossbritannien versilbert seine Sprache für 17 Milliarden Euro, Interreto

O. Haszpra, Egaleco kaj alta efikeco en la internacia komunikado, Literatura Foiro 223, ISSN 0393-2907, 2006

S. Ó Riain, Ein englischsprachiges Europa, Verein für deutsche Sprache, 2004
 L. Áron, Die wirtschaftlichen Auswirkungen der sprachlichen Ungleichheit, College for Modern Business Studies, Tatabánya, Hungario, 2007-
<http://www.ekolingvo.com>

W. Günther, Interna ideo, homaj rajtoj kaj ekologia perspektivo, Scienca Revuo, vol 60 (2), n-ro 217, p. 72, 2009

www.verduloj.org (Asocio de Verduloj Esperantistaj, Esperanto & Ekologio)
 Sprachrechte. Déclaration Universelle des Droits Linguistiques, Barcelona, 1996

H. Erasmus, Das Sprachenproblem in Europa,
http://www.lingviko.net/db/06_Erasmus.htm

Übersetzung von Europa-Dokumenten,
<http://www.adatrad.com/blog/uebersetzung-von-eu-dokumenten/>

Abschlussdokument der Konferenz "Die Zukunft der europäischen Mehrsprachigkeit in einer erweiterten Europäischen Union", interreto UN. United Nations Millennium Declaration 55.2, 2000

W. Sachs, Abschied vom Aufholen, forum 188, 1998

W. Sachs, Ohne Ökologie keine Menschenrechte. Welche Globalisierung ist zukunftsfähig?, Wuppertal Papers Nr. 131, 2003

W. Sachs, Ohne Ökologie keine transnationale Gerechtigkeit, Polis 1, 2004

D. Brocchi, The Cultural Dimension of Sustainability, Institut Cultura21 e.V., Köln, 2007

D.L. Loy, Die Religion des Marktes,
<http://www.buddhanetz.org/texte/marktreigion.htm>

R. Sperry, Naturwissenschaft & Wertentscheidung, Piper, ISBN 3 492 02937 x

B. Köhler, Die Evolution in Natur & Gesellschaft – wohin führt sie uns?,
<http://www.bertramkoehler.de/vortragBuch.htm>

N. Einhorn, Den Wandel wollen http://www.zist.de/arbeit/inhalt_art_einhorn.html

UEA, Manifesto de Prago, 1996 www.uea.org (Universala Esperanto-Asocio)

Adreso de la aŭtoro

Dr. Wolfgang GÜNTHER

Ap 270

ES – 03170 – Rojales (Alicante)

HISPANUJO

<w.guenther.esperanto@web.de>

Priaŭtoro informo

Tiu ĉi teksto de "advokato de konsekvenca prevent-medicino kaj prevent-ekologio", estis verkita por GEK/EEK 2009 en Herzberg, Germanujo, kaj prelege realigita dum la 68-a Hispana Kongreso de Esperanto en Malaga, Hispanujo 2009.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– La angla kaj rusa komparacioj –

Gerald TUCKER

Ankaŭ en la angla ekzistas la trištupa komparacio. Kvankam ĝi estas baze ĝermana lingvo tre proksime parenca kun la germana, ĝi krome estas, kiel Esperanto, leksike miksa lingvo ĝermana-latinida. La angla, tamen, estas ankaŭ struktura miksaĵo kaj havas kaj ĝermanan kaj latinidan komparaciojn. Laŭ certaj kriterioj unuj komparaciigas ĝermane, aliaj latinidaj kaj kelkaj ambaŭe. Ankaŭ la angla permesas al si aron da kontraŭsistemaj formoj.

La ĝermana komparacio

La bazo de la ĝermana komparacio estas, simile kiel en la germana, fleksioj: komparativa **-er** kaj superlativa **-est**.

Ĝermane komparaciigas:

2. ĉiuj unusilabaj adjektivoj:

pozitivo	komparativo	superlativo
<i>clean</i> [kli:n] "pura"	<i>cleaner</i>	<i>cleanest</i>
<i>new</i> [nju:] "nova"	<i>newer</i>	<i>newest</i>
<i>cheap</i> [ĉi:p] "malkara"	<i>cheaper</i>	<i>cheapest</i>

3. dusilabaj adjektivoj kun jenaj finaĵoj:

2.1. –y

pozitivo	komparativo	superlativo
<i>dirty</i> ['dɜ:ti] "malpura"	<i>dirtier</i>	<i>dirtiest</i>
<i>easy</i> ['i:zi] "facila"	<i>easier</i>	<i>easiest</i>
<i>happy</i> ['hæpi] "feliĉa"	<i>happier</i>	<i>happiest</i>
<i>pretty</i> ['priti] "beleta"	<i>prettier</i>	<i>prettiest</i>
Sed: <i>shy</i> [ŝaj] "timida"	<i>shyer</i>	<i>shyest</i>

Ĉi tiu regulo validas, kiam la litero antaŭ –y estas konsonanta. Post vokala –y ĉi tiu ne ŝanĝiĝas.